
LA VERDA LUPEO

Informilo de ELF/AREK

Aŭgusto 2015 (47a jaro) N-ro 169

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Privatpoŝta eldono RBS (Schleiz)




Privatpoŝta eldono P & Y (Saalfeld)

La E-tema privatpoŝta marko por la E-isto BARTHOLDT


Ne temas pri „individua“ pm, sed pri „privatpoŝta“. Eldonas ilin privataj lokaj kaj regionaj poŝtservoj. En Germanio ekzistas multaj. Por ekspedo de leteroj prefere utiligas ilin grandaj entreprenoj kaj ŝtataj oficejoj ĉar la tarifoj estas pli malaltaj kompare al tiuj de la ŝtata poŝto. Tiuj privatpoŝtaj firmaoj disponas pri propraj surstrataj poŝtkestoj kaj leterportistoj.
En junio 2009 tri poŝtservoj en la federacia lando Turingio de Germanio eldonis komunan pm-serion en malsamaj kvarblokoj memore al du famuloj de la urbo Schleiz. Unu el la ambaŭ estis R. Bartholdt, esperantisto, kiu 1914 en la usona parlamento pledis por enkonduko de E-instruado en la lernejojn de Vaŝingtono.
La poŝtmarko montras la broŝuron
„Esperanto – Hearing before the Committee on Education“ kaj „Esperanto“.
Bonŝance la nekonata iniciatinto metis en la kvarblokon ankaŭ markon kun la portreto de Bartholdt.
Estis nia kluba amiko Piton kiu vidis la markon ĉe ebay-aŭkcio, du jarojn post la eldontago.



Regiona Leterservo Schütze
JENA (RBS)




Postkutscher
und YOUNG / Aktive Mail
SAALFELD (P & Y)



WISENTA Kuriero R. Brossmann SCHLEIZ (WSR)

Richard BARTHOLDT




(naskiĝinta la 2an de novembro 1855 en Schleiz, Germanio; mortinta 1932 en Sankta-Luizo, Usono) estis usona politikisto de la respublikana partio. Li elmigris en Aprilo 1872 de sia hejmurbo al Usono. Unue li loĝis en Broklino, kie li fariĝis presisto, verkis por gazetoj kaj laboris kiel eldonisto. En 1877 li transloĝiĝis al Sankta-Luizo; tie li laboris kiel gazeta raportisto kaj redaktisto. Kiam li fariĝis parlamentano en 1893, li estis ĉefredaktisto de gazeto *St. Louis Tribune.*

De la 4-a de Marto 1893 ĝis 1915 li estis membro de la Usona Domo de Reprezentantoj, kiel deputito por la ŝtato Misurio.

En 1914 li proponis al la parlamento rezolucion favore al enkonduko de Esperanto kiel studobjekto en lernejojn en Vaŝingtono. Li klarigis i.a.:

Mi legis en kelkaj Esperanto-gazetoj, ke ekzemple en Anglio grandaj fabrikoj nun presas siajn katalogojn kaj prezarojn en Esperanto, kaj ke aliaj komercaj presaĵoj en tiu lingvo estas dissendataj al la tuta mondo....

Ĝi estas tre facila lingvo. Mi lernis ĝin dum kvar lecionoj. Kompreneble mi ne havis la tempon por daŭrigi, kaj necesas praktiki. [...] Ĝin konsistigas vortoj el la angla, germana kaj latina lingvoj. Sed la tuta konstruo de la lingvo estas tiel rimarkinde simpla, ke oni demandas sin, kial oni ankoraŭ ne enkondukis tian universalan lingvon por la uzo de civilizitaj homoj.



Teksto trovita en la reta Vikipedio

Komplete ĝi legeblas en la reto:

Project Gutenberg EBook of Esperanto: ***Hearings before the Committee on Education, by Richard Bartholdt and A. Christen***



Folio kun 20 52enaj pm (SAKURA kat. PH 23)
Folio kun 20 82enaj pm (SAKURA kat. PH 24)









La 63a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo
20-21 Junio, Kioto 2015



Kongresa koverto sendita de Haruja Maekaua

Aperis:
Kongresa koverto kaj pk

3 Individuaj poŝtmarkoj:
52ena, 82ena eta, 82ena granda





Supre: Folio kun po kvin 52enaj kaj 82enaj pm-oj (SAKURA PH 22)
Sube : Folio kun dek grandaj 82enaj pm-oj (SAKURA PH 21)
La kvar (kolorajn) folio-kopiojn sendis nia Haruja Maekaua. Dankon!










52ena **82ena eta** **82ena granda**

La filatelaĵoj el la 101a Japana Esperanto-Kongreso



Kongresa koverto kun kongresaj stampo kaj pm-oj
sendita de Haruja Maekaua
Aperis ankaŭ kongresa karto kun sama surpreso



Sendita kopio de s-ro Sprick.
Unu marko jam mankas en la folio.
La du rektangulaj fonoj estas bluaj.

La markoj validis nur por ekspedo per *Citipost Weserbergland* al tuta Germanio.

Individua poŝtmarko por la 92a Germana Esperanto Kongreso en Hameln (22-25 05 2015)


La privata poŝtservo „Citipost Weserbergland“ aperigis okaze de la kongreso poŝtmarkon.



Bildo:
Esperanto-simbolo kun teksto en ĝi: ***Legendo kaj Lingvo allogas***
92a Germana Esperanto-Kongreso Hameln 22.-25.05.2015
Ratkaptisto per fluto blovas *Esperanto* en la simbolon.
Eldonkvanto: 200 pecoj sur 20 folioj (La marko ne plu haveblas)
Nominalo: 40 cendoj (tarifo por enlanda poŝtkarto)
Unua tago de nuligo: 26a de majo 2015.

S-ano Sprick skribis:
...La motivo estis kuna laboro: la Ratkaptiston desegnis junulino el nia grupo en Hameln, Katharina Korgol. Enkomputiligis tion Pit Hauge el Nürnberg. Mi mem havis la ideon pri la Esperanto-simbolo en la fono, kaj ĉiuj klubanoj decidis, ke mankis ankoraŭ ratoj. Ni havis kelkajn proponojn pri la ratoj, sed fine decidis kaj elektis la ratojn, kiujn desegnis ankaŭ Pit Hauge. La tiparon de la literoj elektis post rigardo de diversaj tiparoj ankaŭ nia grupo kaj finpreparon por la komputilo kiel jpeg-datumo ankaŭ faris Pit Hauge...

En la jaro 2015 je la Pentekosta semajnfino alvenis 170 Esperanto-parolantoj en la urbon. Ilin atendis programeroj pri la temo: fabeloj, rakontoj kaj legendoj.



La bildkarton kun la marko sendis la geedzoj Schwarz. Koran dankon!

Dankon ankaŭ al s-ano Heinz-Wilhelm Sprick pro senditaj informoj.



Stampo „10 jaroj IPA-grupo en Zielona Gora“

La teksto en la stampo estas en la pola. Sed en la mezo montriĝas la emblemo de la Internacia Polica Asocio kun ĝia Esperantlingva slogano.
SERVO PER AMIKECO. Uzita 13.09.2002 en Zielona Gora 1, trovita nur en 2014 de s-ro Deitrich dum ekskurso. Bedaŭrinde la emblemo ne videblas en bona kvalito en la trovitaĵo. Dankon al la trovinto. Li ankaŭ sendis tiun ĉi bildon. La poŝtkarto estas eldonita memore al la 100jara naskiĝdatreveno de la pola kantisto Jan Kiepura (16.05.1902 en Sosnowiec-15.08.1966 en Harris,USA)



101a Japana Esperanto-Kongreso en Obama 2014

Jam priskribita en LVL 167

Sendita de nia Haruja Maekaua

La 49a japana E-stampo



Jen la 50a japana E-stampo

83a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo
2015 en urbo Kioto

Kopio ricevita de Elda
Sendita de nia Haruja Maekaua
Dankon al vi



Centjara Jubileo de Esperanto en Senta

Uzita 19.06.2015

Sendita de Imre Belec
Dankon al vi

Ĝi estis 30 tagojn survoje pro striko de germ. poŝtistoj



Koloroj: flava, blua, ruĝa

Memglua

Folio (9,5x15,5) kun 9 glumarkoj



Koloroj: flava, ruĝa, verda
Mezuro: ?
Memglua
Bildo: Koboldo, stelo



Koloroj: ruĝa, verda
Mezuro: ?




Koloroj: nigra, verda ruĝa
Mezuro: ?
Memglua

Eldonitaj de
s-ano Klaus Brümmer

3000 E-glumarkoj = 5000 euroj

En la itala ebay germana vendisto ofertis kolekton de E-glumarkoj en 3 albumoj.
Temas pri nedatumitaj kaj datumitaj.
Manskribitaj klarigoj en la albumoj ebligas ekscii la kolektinton:
***Georges Saget*, Elbeuf, Francio.**
Li forpasis jam antaŭ jardekoj.
Saget 1951 pretigis i. a. ankaŭ liston pri E-tutaĵoj.
1962 li kunlaboris por la Katalogo de E-glumarkoj de Reinhold Jensen.



Georges Saget (1951)

★





Jen nia Zamenhof-pm de 1927 kun perfino.
Temas pri sendenta eseo, ofertita en ret-aŭkcio. Konkuris 8 interesuloj.
Venkis propono de 130 us-dolaroj.



Ankaŭ tiuj ĉi rubaĵoj trovis lokon kaj aĉetanton en reta aŭkcio.

La prezo estis fabele impona.





**Meze la volapukano kaj esperantisto Pietro Poletti,
kiu en Amoy sin nomigis YANG YEN-NUNG.**



1898 sendita de Poletti (Yang Yen-Nung) al Francio



Gratulon al Bert BOON

Li pasintjare iniciatis Esperanto-Numismatikan Asocion. Aliĝis al ĝi jam ĉ. 35 membroj. En junio 2015 li sendis la 3an numeron de la ret-informilo *Esperanta Numismatiko*. Ricevas ĝin senpage per reto ĉiuj membroj.
Aliĝo eblas per reta mesaĝo al s-ro Boon.
Ĉar tiu asocio posedas nek kasiston, nek kason, nek estraron, ne ekzistas asocia kotizo. Necesas tamen posedo de komputilo kun ret-konekto.
Laŭ mia memoro BOON estas prez. de la EK HIRUNDO en Tienen, Belgio.




LYON 1911: Medalo por d-ro Henri DOR
i.a. kun enskribo
TUTMONDA ESPERANTA KURACISTA ASOCIO

(D-ro Dor estis 1906-1912 prezidanto de TEKA
antaŭulo de la nuna UMEA)



Broŝuro E-MEDALOJ KAJ MONEROJ
de Hans Jankowski (1989), Dortmund
-18 paĝoj-



Eldonita de Litova Esperanto-Asocio (2000)
32 paĝoj



Broŝuro ESPERANTOMONO de Hans Jankowski (1993)
18 paĝoj



Broŝuro eldonita 1995 de Hans Jankowski, Dortmund
kun priskribo de 83 E-medaloj el 24 landoj.

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta
BIC: BPPIITRRXXX. Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



La ELF/AREK-poŝtmarkoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe nia prezidantino.



Memor-pk kun bildo de la memortabulo pri la Arbo de Amikeco plantita 1997